

## SIMPOZIA PROGRAMO

MALFERMO	
 <p>T. Malicki</p>	<p><b>Eduksistemo en Pollando (Ĉefprelego)</b></p> <p>Edukado estas unu el sferoj de vivo, kiuj ne konvenas al unuigo. Ĉiu ŝtato povas libervole kreadi sian edukan sistemon. Tio signifas, ke neniu altrudas la elektitan modelon kaj precipe en Pollando ni mem povas kreadi la edukistemon. Oni devas memori, ke en la unuiginta Eŭropo junaj poloj serĉados laborlokojn kaj konkurados je lokoj en superaj lernejoj kun samaĝuloj el aliaj landoj. Do la pola eduka sistemo devos esti tiel konstruita, ke ni havu ŝancojn trovi sian lokon en Eŭropo.</p> <p>En ĉi tiu artikolo estos priskribata detale la sistemo de edukado en Pollando.</p>
 <p>R. Corsetti</p>	<p><b>Szerdahelyi, Frank kaj <i>Springboard</i>: kion komunan ili havas?</b></p> <p>Istvan Szerdahelyi jam en la 60-aj jaroj pripensis la problemojn de la lernofaciliga valoro de Esperanto. Helmar Frank estis la gvidanto de grandskalaj projektoj pri tio. <i>Springboard</i> estas nuna projekto pri tio en Britujo. La prelego provos montri, ke ĉe ili nur iu ĝenerala ideo pri la boneco de Esperanto por posta lernado de lingvoj estas komuna.</p>
 <p>J. Żabowski</p>	<p><b>La postdiplomaj studoj kiel formo de la senĉesa klerigado en la Altlernejo Włodkowiec en Plock</b></p> <p>La unuaj jaroj de la XXI-a jarcento antaŭdiradis grandan bezonon de la instruistaj medioj pri kompletigado de la profesiaj kvalifikoj, akiritaj en altlernejoj klerigantaj instruistojn. La planitaj reformoj de edukado postulis plurajn instruistojn pretaj por realigado de novaj taskoj, precipe por instruado de diversaj lernobjektoj.</p> <p>La dokumento enkondukanta ĉi-reformon, datita la 15-an de februaro 1999 ŝanĝas principe la rolon kaj pozicion de la instruisto en lernejo. La instruisto ne respondecos nur pri realigado de la propra instruobjekto kaj eventuale pri la eduka laboro en klaso, por kiu li estas edukisto. La reformo devigas instruiston respondi pri harmonia, tuteca, kompleksa progreso de ĉiu lernanto, sendepende de la lernobjekto.</p>
 <p>A. Łomnicki</p>	<p><b>Diversaj formoj de aktivigado de studentoj dum Esperanto-lecionoj</b></p> <p>Dum jarcentoj gepatroj instruis siajn infanojn sen strikte difinitaj reguloj, junaj homoj akiradis spertojn kaj scion parolante kaj disputante kun plenkreskuloj. Ni ne forgesu tiun ĉi vojon de trankvila evoluo, precipe por transdoni niajn pensojn kaj pasion, aktivigante lernanton – unu lernanton, du aŭ tri lernantojn, kelkajn lernantojn. Tiu ĉi situacio – etnombraj grupoj da gelernantoj – ĝis nun plej ofte ekestas dum E-lecionoj. Ĉiu E-instruisto povus priskribi interesajn ekzemplojn de aktivigado de lernantoj. Tiamaniere kreskus aro da reguloj, kiuj transformiĝus en principojn de edukado.</p>

	<p><b>Premisoj por fondo kaj funkciado de Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj en la Altlernejo Włodkowic en Płock</b></p> <p>La Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj estis fondita en la kunlaboro inter la Altlernejo Włodkowic en Płock kaj Pedagogia Universitato en Jaroslav (Rusio) surbaze de la interkonsento, datita la 30-an de oktobro 2006. Tiu ĉi instituto ekestis por helpi la komprenon kaj forigon de la kulturaj barieroj, trarompi la kulturan diversecon kaj negativajn stereotipojn formiĝintaj dum la pasintaj homaj kontaktoj. Nuntempe en la unuiganta mondo ekestis forta bezono de interkultura komunikado. Kontaktoj inter civitanoj el la ŝtatoj strikte najbaraj kaj ankaŭ malproksimaj, kaj defioj, kiuj pro tio efektiviĝas, fariĝas ĉiam pli oftaj.</p>
<p>Diskutoj</p>	
	
	<p><b>Rolo de Esperanto en la interkultura komunikado</b></p> <p>La interkultura komunikado havas kulturan kaj speciale lingvan flankon. Esperanto estis kreita por solvi la lingvan problemon. Kvankam ankaŭ Esperanto multe evoluis kaj elformiĝis propra kulturo, ĝi pli taŭgas por la interkultura komunikado ol la kulture ŝarĝitaj naciaj lingvoj. Por efika interkultura komunikado necesas malfermiteco por aliaj kulturoj kaj konsciigo pri la kulturaj diferencoj krom la kunlaboremo. La prelego analizos, kiomgrade Esperanto povas ponti inter kulturoj, kaj kiel eduki al efika interkultura komunikado per ĝi.</p>
<p>I. Koutny</p>	<p><b>Ĉu vere ekzistas Esperanta kulturo?</b></p> <p>Ofta kritiko al Esperanto kiel internacia pontlingvo estas la supozata manko de kulturo, kiu malriĉigas la komunikan procezon. Malfacile estas kontraŭi tiun opinion, ĉar fakte Esperanto ne estas ĉiutaga lingvo de komunumo kiu loĝas kune. Kroma problemo estas malklareco de la nocio 'kulturo'. En ĉi tiu referaĵo estos prezento de la teorio pri kulturo de Geert Hofstede, kiu enhavas klaran difinon de kulturo kaj simplan metodon por diagnozi ĝian ekziston. En lia modelo, grupo kiu havas komunajn simbolojn, heroojn kaj ritojn, verŝajne havas komunajn valorojn, kaj tiuj valoroj estas la kerno de kulturo. Estas certe, ke inter esperantistoj ekzistas komunaj simboloj, herooj kaj ritoj. Sed ne estas klara, ĉu ili havas komunajn valorojn.</p>
	<p>M. Faris</p>
	<p><b>Psikoaktivaj metodoj en la instruado de fremdaj lingvoj</b></p> <p>La prelego estos dediĉita tute al prezento de NLP (neŭrolingvistika programado) kaj al eblecoj de ĝia uzo en instruado kaj lernado. NLP estas unika metodo realigi celojn, kiu proponas i.a. utiligi spacon, movon, koloron kaj la proprecojn de la bazaj sensaj sistemoj de la homo. Ĝi ankaŭ montras, kiel kreiĝas kaj funkcias niaj individuaj perceptaj filtriloj kaj pensaj modeloj, kaj kiel eblas utiligi tion en lernado. Objekto de interesiĝo de tiu metodo estas ankaŭ bildigaj teknikoj kaj metodoj pliprofundigi la memkonscion kaj plilarĝigi sian propran psikan komforton.</p>
<p>M. Janiszewska</p>	<p><b>Renovigeblaj energifontoj — ŝancoj kaj degioj</b></p> <p>Turnopunkto en intenseco de ekspluatado de naturaj provizoj sekvis en la XIXa jarcento kune kun forta plirapidiĝo de evoluo de tekniko kaj signifa pligrandiĝo de nombro de loĝantaro de la Tero. Komence energion liveradis natura medio en formo de naturaj stokoj de netrasmovitaj brulmaterialoj kiel ekzemple ligno, karbo, lignito, petrolo aŭ gaso. Konsidere al kreskanta minaco ligita kun</p>
<p>L. Piekut</p>	

	<p>ŝanĝoj de klimato oni devas strebi al eble plej vasta aŭ eĉ universala aplikado de renovigeblaj fontoj de energio. Sub nomo „energio originanta el renovigeblaj fontoj“ oni komprenas energion de vento, sunradiado, movo de akvo en maroj kaj riveroj, varmegan akvon el eno de tero kaj energion de biogaso, kiu estas akirata el biologiaj substancoj en procezoj de iliaj brulado aŭ putrado.</p>
Diskutoj	
<b>TAGMANĜO</b>	
 <p>D. Charters</p>	<p><b>La instruado de universalaj etikaj valoroj kiel porpaca pedagogio de Esperanto</b></p> <p>Ĉu ekzistas universalaj etikaj valoroj pri kiuj povas interkonsenti homoj tra la tuta mondo, ĉu religiaj ĉu ne, kaj se jes, ĉu ili estas instrueblaj en la kadro de kursoj de Esperanto, kaj je kiuj niveloj? Partoprenantoj havos la okazon mem decidi kiuj povas esti tiaj universalaj valoroj, kaj konsideri la respondojn de plej diversaj grupoj kaj mondkulturoj. Post tio oni prezentos kaj diskutos eblecojn por inkluzivi ilin en la kursmaterialoj kaj pedagogio.</p>
 <p>M. Klakla</p>	<p><b>Diversaj formoj de aktivigado de studentoj dum didaktika procezo</b></p> <p>Precizigitaj dum jarcentoj ĝeneralaj principoj de edukado (kiel ekzemple: pligrandigado de malfacilaĵoj, kunigado de teorio kun praktiko, ĉu sciencoco) plenumas fundamentan rolon ankaŭ nuntempe kaj malgraŭ provoj de ties modifoj aŭ kompletigoj, formas nekontesteblan elirpunkton dum efektivigado de la diversaj konceptoj de edukado.</p>
 <p>T. Sasaki</p>	<p><b>Pri nuna situacio de Esperanta edukado en Japanaj universitatoj</b></p> <p>Vd. artikolon en „La Revuo Orienta“ (Japanio), majo de 2009, numero 1054, pp. 16-25 <i>Instruado de Esperanto en universitatoj</i></p>
 <p>J. Hawlena</p>	<p><b>Rolo de sciencaj rondoj en la eduka procezo de gestudentoj pri ekonomiko</b></p> <p>Ekonomikaj studoj ne povas sin apogi sole sur transdonado de teoria scio; tiu devas esti kompletigita per aspektoj praktikaj. Tia bezono estas prezentata precipe de elstaraj studentoj. Ĉi-aspekto larĝan spektron de interesiĝ-disvolvado ebligas partopreno en laboroj de scienca rondo. Oni devas priatenti kelkajn bazajn direktojn de ilia agado:</p> <ol style="list-style-type: none"> <li>1. partopreno en scienca esplorado kaj kunlaboro kun entreprenoj de elektita sektoro,</li> <li>2. akiro de praktikaj scipovoj per preparado kaj organizado de konferencoj,</li> <li>3. preparado de studentoj por komenci doktoriĝajn studojn, precipe per ebligo fari publikaĵojn,</li> <li>4. plilarĝigado de la interesiĝoj pere de laŭtemaj vojaĝoj.</li> </ol>



A. Urbanek

## Diskutoj



A. Pisowicz

### Esperanto — ŝanco por la Kaŭkaza regiono

Kaŭkaza regiono en ĉi tiu teksto havas larĝan signifon: kiel teritorio, kiu ampleksas ne nur terenojn situatajn tuj norde kaj sude de la montĉeno nomata Kaŭkazo, sed ankaŭ la tutan teritorion de tri ekssovietaj landoj: Kartvelio, Azerbajĝano kaj Armenio. En tiu teritorio estas uzataj pluraj, ofte tute ne parencaj (do ne similaj inter si) lingvoj, kiuj apartenas al tiaj familioj kiel hindoeŭropa, tjurka kaj kvar grupoj de kaŭkaziaj lingvoj.



L. Ligeza

### Pri poezio de Julia Pióro

Julia Pióro (1902-1988) Polino. Esperantistino de 1956. Poetino, filozofino. Ŝi publikigis novelojn kaj poemojn en multaj diversaj gazetoj. Plimulto da verkoj restis en presitaj hejmmaniere volumoj. Aperis: El tero kaj etero (novelaro 1964), Hieroglifo (novelaro 1979), Fenestro Kristala (noveloj kaj poemoj, 1981). Speciale ŝi interesiĝis pri filozofio de Oriento kaj *agni joga* (jogo de fajro), do ŝiaj poemoj emanis per multkolora kaj diversforta lumo. Bildoj de la mondo en ŝia percepto memkompreneble gravas, sed antaŭ ĉio gravas meditado reflektanta netipe observatan jarsezonon, momenton de la tago aŭ nokto — en urbo aŭ sur pli vasta spaco.




W. Jakubczyk

### Taskoj de moderna edukado kaj Esperanto

Edukado de la homo ekde ĉiam ligiĝis kun kultura transdono de generacioj en kiu scienco kaj vivsperto estis kompletigitaj per universalaj ĝeneralhomaj valoroj kaj per dialogo. Profesoro Z. Kwieciński opinias, ke en la nova realo post unuiĝo de Eŭropo „precipe grava devo de la publika edukado estas formado de kompetenteco de ĉiu individuo al la kritikema pensado kaj kreopova agado por la komuna prospero“.

Nuntempa edukado konsentis defii okupiĝi pri postuloj formulitaj de la Internacia Komisiono pri Edukado de la 21-a jarcento en la raporto: „Edukado. Estas en ĝi kaŝita la vera trezoro.“

	<p><b>Lingvokulturemoj en esperantaj tradukoj de ukrainaj tekstoj</b></p> <p>La prelego estas dediĉita al la leksiko kun kultura komponento (lingvokulturemoj) en E-tradukoj de ukrainaj belartaj kaj sciencopopularaj tekstoj. Temas pri problemoj de tradukado de realaĵoj (geografiaj kaj propraj nomoj, nomoj de manĝaĵoj, trinkaĵoj, vestaĵoj, diversaj historiaĵoj k. t. p.), simboloj, specifikaĵoj gramatikaĵoj kiel parto de ukraina mondobildo.</p>
<p>N. Danylyuk</p>	
<p>Diskutoj</p>	
	
 <p>W. Stepniewski, Z. Stepniewska</p>	<p><b>Kiu lingvo por estonta Eŭropo kaj mondo?</b></p> <p>La aŭtoroj prezentas bazajn informojn pri la lingvoj de la mondo, pri deveno kaj evoluo de la hindeŭropa lingvogrupo, procezon de pereado de la lingvoj de etnaj minoritatoj, aktivaĵoj de lingvistoj celantaj savi mortantajn lingvojn aŭ almenaŭ informon pri ili kiel egzemple la „Projekto Rozetta“. Poste sekvas priskribo de plej konataj provoj krei planlingvojn (Balai balan, Volapuko, Esperanto, Ido, kaj Interlingua) kaj revivigo de hebrea lingvo. Finfine la aŭtoroj prefere starigas ol respondas la demandon pri la lingvo de la estonto. Ĉu ĝi estos la angla, la mandarina ĉina lingvo aŭ unu el la planlingvoj? Ĉu niaj nepoj havos elekton inter la ĉina kaj Esperanto?</p>
<p>Diskutpanelo laŭ la Simpozia temo</p>	
<p>FERMO</p>	
<p><b>VESPERMANĜO</b></p>	
<p>Stano Marček Ekspozicias lernolibron tradukitan en 20 lingvoj</p>	
<p>Lingva Festivalo (provludoj de lingvoprezentoj antaŭ partopreno en urba aranĝo)</p>	
<p>Koncerto de Amir (Espo Despo) kaj Internacia vespero</p>	
<p>Augusto Casquero de la Cruz regalas per hispana vino / distra programo</p>	

Simpozion gvidas W. Stepniewski kaj I. Koutny.